


# LA PLANEDO DE LA SENFELAJ SIMIOJ kaj aliaj rakontoj



Thierry SALOMON

 ABONASOFT

Koverta bildo: Rusta makulo sur budapeŝta ponto kiu similas al Leonardo Da Vinci aŭ Voltaire

Elektronika versio

Budapeŝto, novembro 2008

La papera versio estas aĉetebla ĉe la kutimaj libroservoj.

Papera versio

Budapeŝto, septembro 2005

ISBN 963 218 213 8

© 2005 Thierry SALOMON

ABONASOFT

abonasoft@gmail.com

<http://abonasoft.inf.hu>

HU-1093 Budapest

Bakáts utca 1/3

Tel./Fakso +36 1 2173912

# LA PLANEDO DE LA SENFELAJ SIMIOJ

## Unua raporto

ESTIMATAJ ALTRANGULOJ, MI BONE ATINGIS LA CELPLANEDON. Pro malfacila surplanediĝo la spacoŝipo iom damaĝiĝis. Mi ankoraŭ ne povas komuniki faktojn. Dum mia alveno la parto de la planedo ne estis lumata per la radioj de la apuda stelo. Rekontakto post la kaŝo de la spacoŝipo.

## Dua raporto

Sur tiu planedo loĝas ĉefe mamuloj.

Apud la kreskaĵa parto kie mi alvenis troviĝas multaj kvarpiedaj grandaj kaj kornaj. Sed ne ili regas sur la planedo, kiel mi unue pensis. Per forvidilo vidiĝis ke la reganta speco konsistas el grandaj simioj. Ili estas senfelaj kaj diverskoloraj. Troviĝas ankaŭ aliaj bestoj kaj bestetoj. Bonŝance ni bone elektis la alven-lokon. Ĝi ne estas tro dense loĝata. Mi faras sciencajn analizojn antaŭ ol okupiĝi pri la vivantaĵoj. Ĉi tie la lumiĝo daŭras 10 zukojn\*, Varmeco 100 egalas al mukoj\*.

\*Noto de la tradukisto : mezurunuoj

## Tria raporto

Espereble la du raportoj kaj la unuaj kemiaj analizoj bone alvenis. Okazis akcidento kiu endanĝerigis la sekreton de nia misio. Unu senfela simio ekvidis min. La ununura solvo por protekti la sekretecon de la misio estis ĉesigi lian vivon. Tiu bedaŭrindaĵo tamen havas bonan flankon. Ĝi helpas al nia scio pri la anatomio de tiuj bestoj. Cetere la ŝelo de tiu specimeno bonvenis por preni ĝian aspekton kaj pristudi de pli proksime ties socion.

## **Kvara raporto**

Mi sendas ĉi-kune la anatomiajn rezultojn.

La antaŭpreparo de la ekstera parto de la specimeno kaj la trejno moviĝi kiel ĝi, necesis kelkajn tagojn. Sekvis ekspedicioj en lokon kie multaj vivas kune. Tie la senfelaj simioj loĝas unu super la alia en grizaj nestoj.

Aliaj bestoj ŝajne ankaŭ regas en la urboj. Pli etaj, iras kvarpiede, lasas en ĉiu angulo spurojn, ofte tiras simion post si.

La imitado de la movmaniero nefacile progresas. Tial mi sidas sur eksterajn larĝajn sidlokojn observante, kaj registrante.

Dum la tago okazas du grandaj migradoj. La unua matene. La dua en la kontraŭan direkton vespere. Verŝajne tiuj kiuj dormas en unu loko devas nepre pasigi la vekajn horojn en alia parto de la urbo kaj inverse. Ili strange moviĝas en la stratoj. Rigardante antaŭ si kiel hipnotitaj. Ŝajnas kvazaŭ ili ne vidus unu la alian.

Hieraŭ malkreskis iomete miaj konscienciproĉoj post kiam mi rimarkis ke nemalmultaj simiinoj ankaŭ surmetas bestofelojn.

## **Kvina raporto**

Hodiaŭ matene dum esploraj laboroj en la urbo, okazis incidento. Du simioj vestitaj en bluaj vestaĵoj venis al mi. Sur iliaj ĉapoj kaj vestoj brilis metalaj insignoj. Kvarpieda estaĵo akompanis ilin. Ĉiuj tri alparolis min. La eta besto plej laŭte kaj multe. Ne komprenante iliajn sonojn, mi provis uzi miajn kolektitajn observojn. Mi plurfoje vidis, ke kiam du virsimioj renkontiĝas, ili kutimas kunigi siajn manojn kaj skui ilin. (Cetere se temas pri inaj simioj aŭ familianoj, tiam okazas flaro de la orelo ambaŭ flanke de la kapo.) Do mi etendis mian manon por skuado. La pli dika simio faris mienon, kiu laŭ miaj notoj signifas surprizon. Tamen post iom da tempo, li prenis kaj skuis "mian" manon. Li strange

rigardis ĝin kaj denove alparolis min. Ankaŭ iliaj nazoj moviĝis. Signo ke ili superas nin je flarokapablo. Tiam mi ekkomprenis la problemon. La korpo en kiu mi troviĝis ne havis normalan temperaturon. Krome la varma tago pli rapidigas la putriĝon kaŭzante malbonodorajn gasojn. Kiam ilia intenco kunporti min evidentiĝis, mi forfuĝis.

### **Sesa raporto**

La akiro de nova "vestaĵo" surprize montriĝis pli facila ol planite. Eĉ ne necesis malutili al ties posedanto. Imagu ke post la fuĝo de bluaj simioj, en eta strato mi forlasis la antaŭan "vestaĵon" por moviĝi pli rapide. Ĝuste tiam ne tro juna kaj iom grasa virsimio ekvidis min. Li tuŝis la bruston je la maldekstra flanko (kie laŭ la anatomiaj esploroj troviĝas fluaĵopumpilo) kaj mem ĉesis vivi. Mi kaptis la okazon kaj la korpon, kunportante ĝin en la kaŝejon. Espereble ĝi eltenos pli longe ol la antaŭa. Flego per kemiaĵoj kaj frostigo kiam ne uzata, devus helpi. Krom tio mi komencis lerni la komuniksistemon de la simioj. Ĝi konsistas el vibrigo de la ĉirkaŭa gaso. Aparato, metebla en la gorĝon por aŭdigi la diversajn sonojn, estas preskaŭ preta. Por lerni tiun lingvan kodon helpas la registraĵoj faritaj en la urbo, kaj la scimaŝino\*. Mi reiris en vendejon, kie mi vidis sonbildaparaton kiu povas taŭgi por la lingvolerno. Oni donis unu al mi kontraŭ verdaj paperaj folioj kiujn la antaŭa posedanto de mia "haŭto" havis en la poŝo.

Dekuma nombrosistemo regas ĉi-tie.

\*Noto de la tradukisto: iuspeca komputilo

### **Sepa raporto**

Fakte tiu aparato, kiu similas al nia sciovidilo, kaj nomata "televidilo" seniluziigis min. Ĝi devus nomiĝi popola stultigilo aŭ "telestultigo". Interese, ke ĉi tie oni ne uzas ĝin por saĝigi la rigardantojn. Dum la tuta tago ĝi elsendas agresemajn

kondutojn. Malmultas la edukaj programoj. Tio ne helpas al mi por lerni esprimojn kaj adekvatajn kondutojn por bone impresi. Tamen progresas mia lingvoakiro.

## **Oka raporto**

Nun kiam mi povas alproksimiĝi al la simioj sen vekti ilian misfidon per odoroj aŭ nekomunikado, povas komenciĝi la dua fazo de la studmisio.

Ni komencu per la energia fonto.

La senfelaj simioj manĝas ĉefe kadavrojn de aliaj vivaĵoj. Sur tiu planedo terure alta elcentaĵo de la simioj mortas ĉar ili ne havas englutaĵojn. Kaj laŭ sciencaj libroj aliaj mortas ĉar ili malbone aŭ eĉ tro multe englutas.

La rezultoj de la dua anatomia esploro montris ke, tio estis ankaŭ la kazo de tiu kies korpon mi uzas nun.

Kelkaj energi-replenigaj kutimoj malhelpas al la sano.

Interese ke multe da laboro kaj energio estas foruzita por "blankigi" manĝaĵojn. Oni forprenas la ŝelojn de cerealaj grenoj, kaj rizo. Sed tiuj tamen ŝajnas enhavi utilajn nutrerojn. La altiriĝo al la blankeco, kaŭzas interalie mankojn je magnezio. Tro malofta moviĝo kaj sporto estis ankaŭ konstateblaj. Ĉie vidiĝas ke oni manĝegas venenojn kiuj eble bongustas, sed ne helpas kaj eĉ malhelpas al la organismo. Poste la simioj devas engluti kuracilojn por ripari la damaĝojn. Du ĉefaj venenoj nomiĝas "sukero" kaj "salo".

Ekzistas specialaj kemiaĵoj nomitaj "drogoj". Ties nomoj plej ofte finiĝas per " -ino ". Ekzemple : heroino, kokaino, kafeino, nikotino. Mi ankoraŭ ne vidas klare la diferencon inter tiuj kiuj estas permesataj, kaj tiuj kies uzon aŭ vendon oni strikte punas.

## **Naŭa raporto**

lom pri la okupo de la simioj.

Vi certe memoras pri la jam menciitaj tagaj migradoj. La

celo estas kolekti tiel multe kiel eble da valorpapero dum la tago, por poste interŝanĝi ĝin kontraŭ diversaj aĵoj. Kelkaj forluas siajn muskolojn por streĉaj korpaj laboroj. Cetere kelkaj inaj simioj vere forvendas sian korpon. Sed en la urboj la plej multo, forluas sian cerbon, inteligenton. Intelektala prostituado, dum kiu oni rezignas je libereco, alportas verdan pagpaperon.

Tiu ebligas kolekti aĵojn. Ŝajnas ke la socio ne taksas la homojn laŭ saĝo sed laŭ posedaĵoj. Krom tiu altetaksita papero, ankaŭ iuj metaloj havas valoron. La plej kosta estas flava kaj brilas. Sur nia planedo la sama metalo, tre ofta, valoras preskaŭ neniom.

## **Deka raporto**

Unu el la plej prestiĝaj posedaĵoj estas veturilo.

Nomita " aŭto " ĝi povas moviĝi laŭ la du unuaj dimensioj. Ekzistas ankaŭ tri dimensiaj veturiloj, sed ankoraŭ ne kvar dimensiaj kiel ĉe ni. La graveco de unu simio preskaŭ mezureblas proporcie al la kvalito kaj grandeco de ĝia veturilo. Eĉ kelkfoje, ene de unu simiofamilio estas pluraj aŭtoj. Por matenaj kaj vesperaj migradoj la plimulto uzas tiun aĵon por iri al la laborloko.

Kaj ĉar tia " aŭto " kostas multe, rimarkeblas io paradoksa: Bona simio laboras por aĉeti aŭton, kiun ĝi bezonas por iri labori. Ne klare komprenis mia menso kial ĉiu uzas propran apartan veturilon kvankam eĉ 5 personoj povus sidi en ĝi, kaj multaj iras en la saman direkton. Konsekvence tio kreas tiel nomatan " trafik-marmeladon ". Troa kvanto da veturiloj malebligas la antaŭiron. Mi povas atesti ke oni ne estas instigitaj uzi komunajn transportilojn ĉar ili estas malbonkvalitaj. Se tamen oni uzas ilin, eblas sperti alian manifestiĝon de " individuismo ". Ĝi koncernas " forparolilon " kiu furoras lastatempe. La veturantoj ne parolas kun homoj sidantaj sur la najbaraj seĝoj, sed kun aliaj, kiuj ofte sidas en alia publika transportilo aliloke en la urbo. Iu

kunveturanto kiun mi pridemandis, ŝerce nomas tiun aparaton " stultofono ". Li ankaŭ montris plian similan fenomenon. Kelkfoje en la transportilo la simioj ne komunikas sed aŭskultas artan bruon tiel nomatan "muzikon " per aparateto sur la aŭdorganoj. Mia sagaca najbaro rimarkigis ke ne indas nerviĝi pro la laŭteco de la portebla "bruilo". La aŭskultanto ne faras tion por ĝeni, sed malplena kapo resonas pli multe.

### **Dekunua raporto**

Lastatempe mi iom vojaĝis al aliaj partoj de la planedo per la lokaj tridimensiaj veturiloj.

La koloroj kaj aspekto de la simioj varias.

Mi vidis lokojn, kie neabundas la manĝaĵo.

Ne ĉie estas uzata la komunika kodo el la regiono, kie mi surplandiĝis. Kiel sur nia kara planedo, diversaj popoloj havas sian propran lingvon. Sed ĉi tie ne ekzistas speciala lingvo por la uzo inter la popoloj. Mi rimarkis ke ĉi tiun rolon ludas la lingvo de mia alvenlando. Verŝajne ĉar ĝi posedas la plej fortan armeon. Tio helpis min ŝpari tempon: mi ne devis lerni pliajn simiajn kodojn. Tamen malmultaj parolas ĝin kaj eĉ ne bone. Eble pro ĝia ne tro logika strukturo.

### **Dekdua raporto**

Tiuj simioj ne karakteriziĝas je modesteco.

Longe ili kredis ke ilia eta planedo okupas la centran lokon en la universo. Kaj ĝis antaŭnelonge, certis ke ili estas aparta specio, sen parencaj rilatoj kun la aliaj bestoj. Ankoraŭ nun multaj senfeluloj ne povas akcepti la ideon de fineco de la vivo (la averaĝa vivodaŭro proksimas pli malpli dekonon de nia). Laŭ ilia opinio, ili superas la aliajn estaĵojn ĉar ili enhavas ian " esencon " kies vivo estas eterna. Ĝis nun mi nenion trovis kaj vidis nenian diferencon. Eble niaj aparatoj ne taŭgas por tio. Ekzistas eĉ pluraj tiaj pensmanieroj kiuj disvastigas tiuspecajn ideojn. Ili

diferenciĝas per diversa ekstera formo sed baziĝas sur similaj reguloj kaj kredoj. Ofte temas pri unu aŭ diversaj superestaĵoj kiuj kreis la universon. Multaj simioj submetiĝas dum la tuta vivo al plej striktaj reguloj, por atingi la altan celon esti inda je senfina vivo de sia "animo". Pri tio juĝas la supera kreanto, verŝajne dum iuspeca ekzameno. Kelkajn regulojn mi ne komprenas.

Notindas, ke ĉefa regulo de ĉiuj pensmanieroj (nomataj "religioj") estas "ne ĉesigu la vivon de alia". Sed tamen ili volonte faras tion al tiuj kiuj ne havas la saman kredon. Ĉiu religio sin konsideras sole prava. Dum la vojaĝadoj frapis min la simileco de la "grandaj" religioj kun la primitivaj religioj. Kaj mi ankoraŭ ne vere komprenas la diferencon inter la tiel nomataj "sektoj" kaj la oficialaj akceptitaj religioj.

### **Dektria kaj lasta raporto**

La riparoj de la spacŝipo finiĝis. La vestaĵo difektiĝas iom post iom. Mi ne volas malutili al alia simio, ĉar longtempa vivado inter ili kreis simpatian. Mi plenumis ĉiujn antaŭplanitajn eksperimentojn kaj analizojn de la misio.

Mi resendis gasajn analizojn, ĉar en la urbo ili diferencas de la antaŭaj mezuroj en la kreskaĵarejo. Kompaton ankaŭ mi sentas, ĉar la senfelaj simioj senatente malpurigas la planedon. Eble ili esperas formigri sur alian, kiam tiu ne plu estos loĝebla. Sed ankoraŭ restis tro primitiva ilia spaca teknologio. Ĝis nun ili atingis nur la tute proksiman sateliton. Volonte mi revenus iam por plia misio. Ĉar multaj faktoj restis neklaraj kaj nekompreneblaj...

## LA MONDOLINGVO

"SENSENCAĴOJ! ESTU SERIOZA! KIAL VI SUBTENAS TIUN IDEON DE NEŬTRALA INTERETNA LINGVO?"

La lingvobaroj jam delonge falis. Ĉiuj jam parolas la novan internacian lingvon de la komerco kaj kulturo!"

Kiam Teodoro eliris el la konstruaĵo, kie li ĵus havis pridungan interparolon, tiuj vortoj de la intervjuanto ankoraŭ sonis en lia kapo. Eble li ne devintus mencii sian interesiĝon pri tiu konvencia neŭtrala interetna lingvo. "Fiartefaritaĉaĵo, kiu senkulturigus la homaron!" laŭ la vortoj de la vicdirektoro de la firmao. Kaj ili aldonis "ni telefonos al vi". Teodoro sciis, ke pro tio li certe perdis ĉiujn ŝancojn akiri la postenon.

Li aĉetis la gazeton "die Finanzielle Zeit" kaj iris tagmanĝi en iun "Bratwurst"-ejon. Ĉiuj ĉefurboj aŭ eĉ grandaj urboj nun similas unu al la alia. Dum siaj vojaĝoj Teodoro rimarkis, ke ĉie lumas la samaj emblemoj de la samaj tutmondaj firmaoj. En Angllando, Franclando, aŭ Hungarlando ne plu estas "pubs", "bistrots" aŭ "kocsma" nur tutmonde "Kneipe". Li provis imagi kiel povis aspekti London, Lyon aŭ Budapeŝt antaŭ la milito. Malfacile.

Jes, fakte ŝajnas, ke ĉio ĉi komenciĝis post la dua mondmilito. La Himmler plano financis la rekonstruon de la detruitaj landoj. En ĝi estis multe da propagando. Por unu kilogramo da faruno, tri kilogramoj da propagando. Por unu skatolo da sapo, iom da cerbolavilo. Jam la pacotraktado estis verkita en tiu nova mondlingvo. Tiel la germana lingvo fariĝis lingvo de diplomatio kaj komerco.

Teodoro ne plu povis legi la gazeton. Liaj pensoj estis tro forflugemaj kaj ankaŭ la muziko iom laŭtis en la ejo. Verdire la kompreno de la teksto de la kanteto ne forŝtelis tro da

cerba laboro de la legado. La rekantaĵo estis io kiel "Ich liebe dich mein Schatz". Teodoro eksopiris pri kantoj kun vera teksto kaj kun mesaĝo. En la radioelsendoj aŭdeblas malmultaj ne-germanlingvaj kantoj. Eĉ pli kaj pli da negermanaj kantistoj kaj grupoj kantas en la moda lingvo. Unue dum eŭropa kantokonkurso "Eurovision" skandinavoj faris tion. Ĉar ilia lingvo apartenas al la sama lingvofamilio, ili povis pli facile fari tion. Nuntempe en tiu konkurso, landoj kies reprezentantoj ne kantas germanlingve havas grandegan malavantaĝon. La angloj kiuj havis malbonajn rezultojn dum la lastaj partoprenoj, kaj kiuj nun konsideras sian lingvon maltaŭgan por moderna kantado, decidis ke en la estonteco ilia grupo kantos germane. Koncerne la diskovendadon, dum alilandaj povas vendi nur en loka merkato, germanaj muzikgrupoj povas vendi al la tuta mondo. Cetere, ĉar ne ĉiuj komprenas la tekstojn - sed vera rokmuziko povas esti nur en la germana lingvo, kiel longe la diservoj povis nur esti en la latina lingvo - ili ne bezonas tiom multe atenti pri la vortoj. Sed ilian pligrandan enspezon povas investi en pli bonkvalitan sonon.

Tiu etna lingvo uzata kiel interetna lingvo nun jam tiomgrade invadis la aliajn lingvojn, ke kelkaj (malmultaj) parolas pri "engleutsch". Miksolingvo, kiun oni parolas en Anglujo, angla lingvo miksita kun multaj germanaj vortoj kaj esprimoj. Same en Francujo ekestis "frallemand". Tie, dudek jarojn post la fino de la milito, iu sinjoro Etiemble skribis libron "Ĉu vi parolas frermane?". Kiu dum iom da tempo havis efiketon kaj forpuŝis kelkajn germanismojn, sed poste por unu forpuŝita dek novaj venis. Sed ne estas mode rezisti al tiu fenomeno. Provu diri franclingve "bonne fin de semaine!", oni tuj korektos vin "bonne Wochenende!". Kvazaŭ ambaŭ ne signifus la samon: "semajnfino"! Antaŭ kelkaj monatoj iu franca gravulo pri lingvaj aferoj prelegadis pri tio, ke la franca lingvo tute ne estas en

danĝero ĉar ĝi estas tiom nobla kaj granda. Teodoro rememoris, ke ankaŭ la kapitano de la "Titanic" ion similan afirmis pri la ŝipego.

Dum li promenis, Teodoro preteriris kinejon. Laŭ la afiŝoj klare videblis, ke sep filmoj el dek estas germanaj. En kelkaj landoj oni eĉ ne plu dublas ilin, sed simple uzas subtitolojn. Ĉu por ŝpari monon aŭ por ke la oreloj de la indiĝenoj kutimiĝu al la lingvo de la koloniiganto?

Alveninte hejmen, Teodoro enŝaltis la televidilon. La plej grandaj kanaloj kun tutmonda videbleco estas la germanaj. Grandan influon havas la universala germana novaĵkanalo kies fondintoj estas la sekvuloj de Goebbels. La alilandaj kanaloj montras multajn germanajn produktaĵojn kaj uzas multajn germanajn esprimojn. Ĉefe la anglaj televidkanaloj. Ekzemple la novaĵoj ne plu nomiĝas "news" sed "BBC Nachrichten". Anglollando eĉ kreis germanlingvan kanalon: "La angla ondo". Teodoro kanalumis. Sed ĉie nur propagando por stultigi la koloniigitojn.

Li elŝaltis la televidilon kaj sidiĝis antaŭ la komputilon. Ankaŭ tiukampe la germana regas. Ĝi estas la lingvo de komputiko, kiel siatempe la latina lingvo estis la lingvo de la eklezio. En Germanlando naskiĝis kaj ekfloris komputado kaj la unuaj kalkulilegoj. Pro tio ili enhavas la kodon por skribi ĉiujn literojn de la germana alfabeto, sed ne la literojn kun supersignoj de la aliaj lingvoj. En la fako de Teodoro svarmas la germanaj vortoj. Eĉ en la aliaj landoj oni uzas la "qwertz" klavaron. Furoras la programoj kun germanaj nomoj kiel "Fenster" kaj "Kraftpunkt".

Sed ĉefe en la komerco estas videbla la superrego de la nuntempa mondolingvo. Pro moda kaj prestiĝa fenomeno reklamoj, nomoj de vendejoj aŭ de firmaoj, kiuj enhavas

germanajn vortojn ebligas pli bonajn vendojn. En tiu epoko de tutmondiĝo (aŭ tutgermaniĝo), la germana lingvo fariĝas pli kaj pli la laborlingvo de multaj firmaoj sendepende de geografia lokiĝo. Nemalmultaj firmaoj en Usono, Angllando aŭ Franclando uzas la germanan lingvon dum kunsidoj, eĉ kiam ĉiuj partoprenantoj estas usonanoj, angloj aŭ francoj. Internaj dokumentoj kaj regularoj ekzistas nur en tiu lingvo. Tio ĉiam kaŭzas internan dilemon al Teodoro, ĉar kvankam li tre ŝatas la germanan lingvon, li ne subtenas, ke nacia lingvo fariĝu mondlingvo detruante la aliajn lingvojn kaj kulturojn.

La komerca rego de germana ŝtato kaj lingvo ĉiam fortiĝas pro "diabla cirklo". Germanlando estas forta ĉar ĝi venkis la militon. Tiu ekonomia forteco altigis la uzon de la germana lingvo kiel internacia lingvo. Kaj tiu grandskala uzo de la lingvo, donas ekonomian avantaĝon al la germana ŝtato. La negermanlingvaj studentoj devas dediĉi ĉiusemajne multe da tempo por lerni tiun "universalan" lingvon (dum minimume kvin jaroj). Tempo dum kiu la germanoj povas pli bone studi sian fakon. Tiel ĉefe en la sciencoj ĉiusemajne tiuj lastaj kreskigas sian antaŭecon kompare al la unuaj. Krome la germanoj ĝuas la avantaĝegon povi publikigi kaj dum konferencoj prelegi en la propra lingvo. Iliaj publikaĵoj pro tio estas pli bonaj kaj bezonas malpli da fortostreĉo. Iliaj prelegoj estas pli konvinkaj. Negermanoj, eĉ tiuj kiuj tre bone regas la lingvon ne povos publikigi ion ajn sen relegigi ĝin de gepatralingva germano. Studoj montris, ke dum internaciaj kunsidoj la denaskaj germanparolantoj okupas 80% el la paroltempo. Eĉ post longa lingvolernado la negermanoj malpli bone parolos ol simpla germana senhejmulo. Dum debatoj la germanoj povas diri ĉion kion ili volas, sed la aliaj nur povas diri tion, kion ili kapablas diri germane.

Nun, pensis Teodoro, mezbona fakulo kiu bone regas la germanan lingvon pli valoras ol bonega fakulo, kiu nur mezbone kapablas esprimi sin en tiu lingvo. Germano povas iri eksterlanden kaj gajni monon per lingvoinstruado. Eĉ sen majstri iun ajn fakon li povas facile dungigi. Li tre utilos por korekti tekstojn. Teodoron timigis tiu penso, ke la homaro disdividiĝas en du tavolojn. La gepatralingve parolantoj de la nova "lingua franca" apartenas al la supra tavolo. En tiu nova moderna feŭdismo ili estas la nobeluloj. La uzo kaj instruado de ilia lingvo estas grandega monfonto por Germanlando kaj mona kaj tempa elspezo por la aliaj. Fakte iuspeca lingva imposto.

La alta tavolo de la diversaj landoj servas Germanlandon kaj ties firmaojn. Ili havas la rimedojn por bone lerni la lingvon kaj sendas siajn infanojn en dulingvajn lernejojn aŭ eĉ al Germanlando. Kelkaj eĉ hejme parolas germane kun la idoj, por ke tiuj havu pli bonajn eblecojn poste en la vivo. El ilia kapablo pritrakti kun la anoj de germana imperio, ili rikoltas grandegan avantaĝon. Por ili tiu situacio estas bonega kaj pro tio ili silentigas ĉiujn klopodojn por pli egalrajta internacia lingva politiko. Ili fakte kunlaboras kun la koloniiganto kaj perfidas la propran popolon pro mono. Teodoro pensis, ke la plej taŭga esprimo por nomi ilin estas perfiduloj de la patrolando kaj de la "patrina" lingvo.

En la malpli altaj tavoloj svarmas la snoboj, kiuj klopodas imiti la supran tavolon. Ofte tiuj, kiuj malpli bone parolas la germanan lingvon uzas plej multe da germanaj vortoj kaj esprimoj. Tiel ili aspektas "kulturitaj" kaj laŭmodaj. Tiuj snoboj ĉiam nervozigas Teodoron. Kiam li demandas de ili, kial ili ne uzas la ekzistantan gepatralingvan vorton anstataŭ la modaj germanaj esprimoj, ili klarigas, ke ne signifas la samon, ke estas nuanco, ke ne ekzistas bona gepatralingva vorto por tio kaj simile... Se en la pasintaj

jarcentoj iliaj antaŭuloj rezonintus same, en la plej multaj lingvoj ne ekuziĝintus vortoj por la plej bazaj objektoj kaj aferoj. Teodoro uzas ŝercan strategion kun la snoboj, kies elcentaĵo da germanaj vortoj en unu frazo tro altas. Li simple daŭrigas la konversacion germanlingve. Estas ĉiam tre amuze, kiam la snoboj devas pardonpeti kaj konfesi, ke ili ne bone regas la germanan lingvon.

Ĉio, kio rilatas al la germana kulturo estas konsiderata moda kaj prestiĝa, kio rilatas al aliaj kulturoj estas konsiderata postrestita, malnobla. En la venkintaj landoj regas propagando kaj mitoj. Multaj volas enmigri al la centro de la mondo. Unu post la aliaj, la plej bonaj sciencistoj forlasas la propran landon por labori en (kaj por) Germanlando.

En la fondiga dokumento de la Eŭropa Imperio la lingvoegaleco estis substrekita kiel grava punkto. Tamen malpli kaj malpli uzatas la aliaj lingvoj... por ŝpari kostojn kaj tempon. La Eŭropaj instancoj pli kaj pli ofte dungas ekskluzive gepatralingvajn germanparolantojn. Tiam aŭstroj kaj germanlandanoj havas grandan avantaĝon. Neniu rimarkas, ke tio kaŭzos duarangiĝon de la aliaj lingvoj, malfortigos ilin kune kun ties kulturoj. Jam de kelkaj jaroj, ankaŭ en la gimnazio de Teodoro pli kaj pli multaj elektas la germanan kiel unuan fremdan lingvon. Ege malmultaj lernas aliajn lingvojn.

Ju pli li pripensis pri tiu temo, des pli Teodoro venis al la konkludo, ke la Eŭropa Imperio staras antaŭ historia vojkruciĝo. Unuavide estas du vojoj. La unua - uzi plurajn laborlingvojn - kondukas al la respekto de la lingva diverseco kaj de la egaleco inter la lingvoj. Sed ĝi estas kosta kaj ne praktika vojo. Traduki kaj interpreti inter la diversaj lingvoj bezonas monon, tempon kaj energion. La

alia vojo iras al la direkto de uzo de la nacia germana lingvo por internacia komunikado. La plejmulto de la ŝafoj blinde sekvas tiun "modan" direkton ne konsciante, ke ĝi kondukas al malfortigo de la ceteraj lingvoj kaj kulturoj. Al tutgermaniĝo. Al memvola koloniigo. Ili ne vidas, ke sekvante tiun vojon ili verŝajne devos paroli germane kun siaj propraj nepoj. Se oni rigardus (aŭ volus rigardi, aŭ povus rigardi) pli bone, videblus, ke kaŝita malantaŭ arbustoj de antaŭjuĝoj kaj misopinioj kaj nebulo de falsaj argumentoj ekzistas tria vojo. Sed malmultaj konas la ekziston de tiu tria vojo. Por konservi siajn privilegiojn kelkaj eĉ kaŝas ĝin, neas ĝian ekziston aŭ diras, ke temas pri ĥimera vojo kiun ne eblas uzi. Oni priridas ĝin. Kiel faris la vicdirektoro de la hodiaŭ vizitata firmao. Malmultaj ribelas kontraŭ la kultura kaj lingva imperialismo de la "Pax Germanica". Eble ĉar malmultaj konscias pri ĝi? Teodoron impresas la efiko de la daŭra propagando. Eĉ homoj, kiuj tute ne parolas la germanan lingvon tute serioze asertas, ke "ĉiuj parolas la germanan lingvon". Neniu informas pri tio, ke pli ol 90% de la homaro ne parolas ĝin. Kaj tiel memkompreneble la germana lingvo estas LA lingvo de komerco, komputado, aertrafiko, ŝipumado ktp...

Jes, fakte la INTERnacia lingvo "Esperanto" vere ŝajnas nebezona. Kiu interesiĝas pri neetna plifacila lingvo por interetnaj uzoj? Pri lingvo kiu ebligas samrangan kaj pli efikan interpopolan komunikadon? Pri lingvo dekoble pli rapide lernebla ne nur de la elito? Pri lingvo kies uzo povus savi la diversecon de la etnaj lingvoj kaj kulturoj?

Teodoro iris dormi kaj decidis, ke en la interparolo kun la sekva firmao li eble ne mencios tiun strangan "ŝatokupon". Ĉar "ĉiuj jam parolas la germanan" kaj "ĝi estas facila lingvo" kaj "la plej bona por internacia komunikado"... "la mondolingvo".

## LA MARTELISTOJ

PASINTSEMAJNE MI HAVIS STRANGAN PREMSONĜON. Tiel estis ke en la mondo por enbati najlon oni uzis ŝtonojn ĉar ne estis konata alia metodo.

Tamen antaŭ multaj jaroj iu jam elpensis la martelon. Sed nur malmultaj sciis pri tio. Tiuj malmultaj, kiuj apogis tiun elpensajon nomis sin la "martelistoj". Ili organiziĝis en kluboj kaj asocioj. Ili portis insignon sur la brusto: etan martelon. Bedaŭrinde anstataŭ uzi sian martelon en la praktiko kaj tiel per la ekzemplo konvinki la aliajn pri ĝia utileco, ili senĉese disputis aŭ diskutis pri negravaĵoj. Dum la tuta tempo ili paroladis inter si pri tio, kiom bona estas iliaj marteloj, sed neniam uzis ilin por praktikaj celoj en la vera vivo. Eĉ ne malmultaj aldonis ŝanĝojn al sia martelo por ke ĝi estu pli ronda kaj pli simila al aspekto de ŝtono.

La plej granda martelista asocio estis Tutgalaksia Martelo-Asocio, kiu eldonis la revuon "Martelo". Unufoje jare sub ĝia organizo kuniĝis la ĉefaj martelistoj en ĉiam alia urbo de la mondo. Tie sur la podio malantaŭ longa tablo sidiĝis la organizestroj sub la grandega flago de la martelistoj kun granda martelo en la supra maldekstra angulo. Martelistoj el ĉiuj landoj venis sur la podion kaj unu post la alia per granda martelbato salutis la ĉeestantojn, venintajn el la tuta mondo. Ofte plurmil martelistoj partoprenis en tiu jara Tutgalaksia kunvenego. Sed ĝia efiko por diskonigi la avantaĝojn de martelo en la socio estis preskaŭ nulo eĉ se partoprenintus dekmiloj da personoj. Tamen de la martelistoj ĝi postulis monon pro la kotizo kaj ankaŭ energion. Granda parto de la energio de la Tutgalaksia Martelo-Asocio foruziĝis por la preparo de la kunvenego. Komence de la historio de martelo la unuaj pioniroj uzis ĝin en la praktiko sed poste ĉar la martelistoj uzis sian tempon kaj financajn rimedojn por organizi aŭ partopreni tiajn

kunvenegojn kaj eldoni diversajn gazetetojn pri martelaj temoj, restis nek forto nek mono por uzi tiun ilon en la vera vivo. Pro tio la socio ne povis vidi kiel bone funkcias martelo kaj sekvi ilian ekzemplon. La ceteraj homoj ĝenerale konsideris la martelistojn kiel frenezuloj verŝajne pro la strangaj ritoj. Ofta argumento kontraŭ martelo estis ke ĝi estas artefaritaĵo kontraŭe al la ŝtonoj, kiuj estas naturaj.

Pro la rutino kaj la nekompreneo la martelistoj pli kaj pli izoliĝis de la socio. Forgesintaj la komencan celon ili ne plu laboris por uzo de marteloj en la ekstera mondo. Uzolibroj pri martelado ne estis aĉeteblaj en normalaj vendejoj sed nur en lokoj apartenantaj al la martelista strukturo. Ofte ili nomis la martelon "nia ilo", forgesinte ke ĝi ne apartenas al ili sed estis destinata al la tuta homaro. Ili ne uzis ĝin por enbati najlojn, sed okupiĝi pri martelo fariĝis celo en si mem. Multaj el ili eĉ konsideris, ke martelo estas tro nobla ilo por malpurigi ĝin per praktika uzo. Persono, kiu sekvis tiajn ritojn kaj okupiĝis pri tiaj frivolaĵoj estis nomata "bona martelisto". Se iu provis instrui aŭ vendi servojn rilatantajn al la avantaĝoj de martelo li estis nomata "fikomercisto". Kaj ĉiam estis kiuj ĉizis kaj aldonis ornamaĵojn al sia martelo kaj pro tio ĝi fariĝis ne plu uzebla.

La martelistoj konsideris ke ili formas komunumon. Ili eĉ nomis ĝin Martelio. Tiu virtuala "lando" havis krom la jam menciita flago ankaŭ himnon kies rekantaĵo estis

vivu martel'

vivu martel'

vivu la sankt' martel'

Tute ŝvitite mi vekiĝis. Ĝoje mi konsciiĝis ke tio estis nur premsonĝo. La vekhorloĝo jam indikis la 8an horon. Do mi rapide prepariĝis por partopreni la sabatan kunvenon de la esperanto-klubo...

## SEKRETA DOKUMENTO

ANTAŬ SIA MORTO AMIKO, KIU FORPISIS EN STRANGAJ CIRKONSTANCOJ, SENDIS AL MI KOPION DE ANGLALINGVA INTERNA RAPORTO DE LA USONA SEKRETA AGENTEJO CIA\*.

En la pasinteco ŝajnas ke jam disvastiĝis rumoroj pri kontrolado de la Esperanto-organizoj pere de sekretaj servoj\*\*. Jen sube la traduko de la raporto:

### STRIKTE SEKRETA DOKUMENTO

De ĉefagento XXXXXXXXXXX XXXXXXXX  
C.I.A

Al XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX  
Washington D.C.

Interna noto

Historia resumo de nia agado:

Jam de jardekoj niaj agentoj infiltriĝis en la esperanto-movadon. Estis pluraj kialoj por tiu agado. Unue dum la malvarma milito la esperanto-movado estis kontrolenda organizaĵo ĉar ĝiaj simboloj kaj retoriko similas al tiu de Sovetunio (stelo, "-ista junularo" ktp...).

Poste niaj agentoj kontrolis ĉu ĝi havas ligojn kun Saddam Hussein aŭ islamistaj teroristaj grupoj. Ni suspektas tion ĉar la esperanto-organizoj uzas verdan stelon kaj tiu simbolo troviĝas ankaŭ sur la iraka flago aŭ sur tiu de aliaj islamaj landoj. Same pro la verda flago. Cetere oni raportis pri ioma kontraŭstaro al usona kulturo en tiuj rondo.

Dum nia plurjara agado nia plej granda sukceso estis la flankenŝovigo de la peticio sendita al UN en 1966\*\*\*. Kion

plifruie Francio sukcesis fari lanĉante falsajn kontraŭargumentojn al simila propono en Ligo de la Nacioj\*\*\*\*, tion nia registaro sukcesis fari multe pli diskrete.

Sed nia ĉefa agado estis malfortigi tiun movadon ĉar neŭtrala internacia lingvo endanĝerigas la direktivojn de la angla-usona konferenco\*\*\*\*\* de 1961 kaj kiel vi scias laŭ la vortoj de David Rothkopf "estas ekonomia kaj politika intereso por Usono, atenti pri tio ke se la mondo elektas komunan lingvon tiu estu la angla"

Nia registaro provis gardi sekrete tiun "Anglo-American Conference Report 1961". Bedaŭrinde kelkaj gazetoj aŭ aŭtoroj per helpo de esperanto-apogantoj disvastigas ĝin. En la estonteco ni provos ankaŭ eviti ke usonaj gazetoj skribu pri tiu temo kiel ekzemple la Washington Post kiu artikolis: "La uzo de la angla lingvo grandigas la influon de la anglalingvaj landoj pli forte ol ekonomia potenco aŭ armeo." tiu teksto estis represita en Herald Tribune 7 julio 1992.

Mi ne bezonas rememorigi al vi kiajn grandajn avantaĝojn donas al nia lando la uzo de la angla lingvo kiel internacia lingvo. Ni devas nepre ĉion fari por ke tio ne ĉesu. Per tio ni ricevas fakte lingvan imposton de la neanglalingvaj landoj. Kaj kiel diris la registara konsilanto XXXXX ni estas kvazaŭ sporta taĉmento, kiu ĉiam rajtas ludi en propra stadiono.

Niaj agentoj memlernis la lingvon por povi nerimarkite miksiĝi inter la apogantoj de la internacia lingvo "Esperanto". Ĝi estas bone farita lingvo. La esperanto-organizoj havas reton en pli ol cent okdek landoj. Feliĉe dank'al nia agado ni bone sukcesas bremsi la disvastiĝon de tiu konkurenca idiomo.

Per la influo de subfosa laboro de niaj infiltritaj agentoj ni ĝis nun sukcesis atingi ke la uzantaro de Esperanto aspektu malalloge sekteca kaj okupiĝu nur pri frivolaĵoj. Unu el niaj plej sukcesaj metodoj estas nepre konservigi la uzon de forpeligaj esprimoj, sloganoj kaj simboloj.

Kelkfoje ni devis uzi pli radikalajn ilojn. Ni "forigis" tro aktivajn personojn ŝajnigante ekzemple aŭtoakcidenton, koratakon aŭ alian malsanon.

Ĝis ni sukcesas konservi amatorecon la Esperanto-subtenantaro ne signifos danĝeron por la kultura kaj ekonomia superego de nia lando. Tiucele se iu provas profesie diskonigi Esperanton niaj agentoj tuj instigas aliajn fari ion similan tute amatorece kaj senpage ĝis tiu bankrotas.

Alia optimisma punkto estas ke la esperantoparolantoj pli kaj pli maljuniĝas, la averaĝa aĝo sufiĉe altas. Niaj infiltruloj provas tuj forpeli eventualajn junajn aktivulojn. Krome la juna esperanto-parolantaro montriĝis bona kadro por kutimigi la membrojn okupiĝi nur pri frivolaĵoj kaj ritoj. Tiu asocio povus esti nomita Tutmonda Bambumada Junulara Organizo.

Kiel la plenkreskuloj ankaŭ ili uzas la tutan tempon partopreni aŭ organizi renkontiĝojn. Unu el la malmultaj danĝeroj estas la oficejo en Bruselo kie ili pli profesie laboras. Sed ni provos fermi la monan kranon kaj ĉefe eviti ke la Internacia Esperanto Asocio translokiĝu en la Eŭropan ĉefurbon.

Sur pli lingvaj kampoj ni ankaŭ atingis bonajn rezultojn. Pluraj agentoj jam infiltrumis la akademion de Esperanto. Tie ili sukcese puŝas al direkto de leksikologia harfendado.

Tiel, ke se estonte la granda publiko ekscius pri Esperanto kaj provos uzi ĝin, ĝi estu pli malfacila kaj malpli uzebla.

Nia fona laboro estas ĉiam ree kaj ree veki disputojn pri diversaj negravaj temoj kiel lingvaj reformoj, ĉapelitaj literoj ktp... Pluraj agentoj en diversaj landoj havas la taskon daŭre revekigi tiujn aferojn en la interretaj forumoj.

Raporto, kiun nia agentejo preparis en 1997 jam indikis ke la 5 sekvaj jaroj estos gravaj por starigi la anglan lingvon kiel unikan internacian lingvon. Tio projekto havas la saman gravecon, kiel la ekonomia subaŭskulta sistemo ECHELON, kiun bedaŭrinde ni ne sukcesis gardi sekrete.

Mi do skribas al Vi por peti altigon de nia buĝeto tiel ke per pliaj agentoj nia grupo povu ankaŭ sukcese eviti ke la publiko eksciu pri la temo de egalrajta internacia komunikado.

Kolegaj salutoj,

Agento XXXXXXXXXXXXX

Rimarkoj:

\* Central Intelligence Agency

\*\* Ekzemple aperis teksto de iu nomata Markus pri tiu temo.

\*\*\* Propono, subskribita de preskaŭ unu miliono da individuoj kaj iom malpli ol 4000 organizaĵoj, estis intence prisilentita en la instancoj de la Unuiĝintaj Nacioj.

\*\*\*\* En 1920-23, kiam la franca ankoraŭ estis lingvo de la diplomatio, Gabriel Hanotaux, G. Reynald kaj Jacques Bardoux francaj delegitoj en la Ligo de Nacio sukcesis enterigi proponon favoran al instruado de Esperanto.

\*\*\*\*\* "Anglo-American Conference Report 1961"

Mi decidis publikigi tiun tekston pro propra sekureco. Post la forpaso de mia amiko, mi sentas ke ankaŭ mia vivo estas en danĝero. Do mi sciigas ke mi havas kuracistajn atestilojn, kiuj pruvas mian perfektan sanon. Cetere mi ĉiam tre atente veturas kaj trairas la stratojn. Do se io okazas al mi bonvolu atentigi la policon pri tiuj faktoj...

## REVENO AL ESPERANTOLANDO

JAM DELONGE MI PLANIS TIUN VOJAĜON. KOMENCE DE LA JARCENTO DUM JUNAĜO MI SUFIĈE OKUPIĜIS PRI "TIU" LINGVO. Nun post la emeritiĝo kaj ŝparado de iom da mono, mi povas permesi al mi tiun -verŝajne- lastan turisman vojaĝon. Al la insuleto, kie oni ankoraŭ parolas tiun lingvon.

Ĉie aliloke en la mondo regas la angla lingvo. Mortis la lingva diverseco. Kun miaj nepoj, mi jam devas paroli angle.

La kotonaspektaj nuboj ĉirkaŭas la flugmaŝinon. Mi daŭre uzas tiun vorton, kvankam la uzataj vortoj en Esperantolando estas "aviadilo", "aeroplano" aŭ "avio".

Eble mi devos trafoliumi la kunportitajn libretojn por refreŝigi mian lingvoscion. Jam pasis tiom da tempo ekde...

Ah, jen la kutima paroladeto de la piloto. Estos bona ekzerco. Unue en la angla lingvo kaj poste "... parolas via kapitano. Ni baldaŭ atingos Esperantolandon. Je via *liva* flanko ne tro *lontane* la *pita* makulo estas Esperantopolis, la *kapitalo*...". Hmmm. Preskaŭ pli bone kompreneblas la angla versio.

Origine Esperanto estis planita por fariĝi INTER-nacia lingvo. Sed en la unua kvarono de la jarcento, post ĉiam pli kaj pli da verdnaciismo kaj ŝovinismo de ĝiaj parolantoj tio, kio devis okazi, okazis. La "diasporo" aĉetis insulon meze de la oceano kaj la "esperantistoj" komencis migri tien.

Unue ili volis aĉeti parteton de Groenlando (pro la nomo) sed poste tamen elektis tiun pli foran insuleton. Eĉ estis rumoroj ke la usona sekreta servo helpis tion diplomatie kaj finance por seniĝi de tiu eventuala konkuranta lingvo kaj puŝi ĝin en la forgesojn de la historio.

La alteriĝo estis glata kaj sen troaj skuadoj. Kun la aliaj pasaĝeroj, ni eliris el la flugmaŝino por eniri la flughavenon Zamenhof aŭ pli precize "*aeroporton*" kiel skribiĝas sur la ŝildo.

Ĉe la dogano, verdaj uniformuloj kontrolis la envojaĝantojn. La nombro de steletoj sur la ŝultro indikas la rangon. Por enmigri necesas havi verdan karton. Por viziti la insulon invitletero sufiĉas. Malnova konatulo de mi sendis ĝin al mi. Mi estas iom nervoza, ĉar mi eniras per falsa nomo kaj pasporto. Mia vera nomo troviĝas sur la nigra listo, ĉar en la pasinteco mi agis kontraŭ la fondo de tiu ŝtato. Dustela doganisto funde traserĉis mian valizon. Li atente tralegis la pasporton kaj poste diris "Sinjoro, *bienvenuto* al Esperantolando!".

La taksio malrapide veturis tra la avenuo Zamenhof. Ambaŭflanke de la strato staris longa sinsekvo de flagoj. Ĉi tie la verda standardo vere fariĝis normo. Mi demandis al la ŝoforo ĉu ni povus fari kromvojon tra la stela placo. Mi multe aŭdis pri tiu placo. "OK, ne 'stas problemo ni *bifurkos liven* kaj per tiu *streta* strato ni tuj estas tie". Jen la fama loko. La verdstela placo estas unu el la ĉefaj turistaj vidindaĵoj de Esperantopolis. Ĝi vere aspektas stelforme ne kiel la samnoma en Parizo. Kvin avenuoj disradias laŭ la branĉoj de stelo. Meze de la ronda placo herbejo formas verdan stelon.

Pli poste mi petis la taksioŝoforon halti. Ĉi tie estis interkonsentita rendevuo kun la malnova konatulo. Mi pagis la 300 steletojn kaj donis iom da trinkmono al la ŝoforo. Ĉar restis ankoraŭ multe da tempo antaŭ la preparolita horo mi promenis iomete.

Laŭ avenuo Kolker mi ekvidis librovendejon. En la montrofenestro majeste kuŝis la fama vortaro PIV. Nun ĝi

jam estas preskaŭ samdika kiel larĝa. Tamen mi iom miris, aŭdinte la multajn novajn vortojn, ke ĝi ne estas eĉ pli granda. Nur tiam mi rimarkis la subtitolon “unua parto: literoj A ĝis F”... Apud ĝi majeste sidis la lasta eldono de Plena Analiza Gramatiko. La varboteksto sur la titolpaĝo anoncis “la 16000 regulojn de Esperanto”. Ĝia pezo verŝajne jam superas 5 kilogramojn. Suspirante mi promenis plu. Sur la fasadoj de la oficialaj konstruaĵoj svarmis la verdaj flagoj. La bela konstruaĵo de la Akademio videblis ne tro malproksime. Ĉar mi havis ankoraŭ pli ol dudek minutojn, mi decidis promeni tien, tio benefikos al miaj maljunaj kruroj, kiuj iom suferis pro la vojaĝo. Survoje mi cerbumis ke tiu instanco tutcerte jam delonge atingis la celon oficialigi pli da vortoj ol estas en la Oxford vortaro. Simbola "venko" super la angla lingvo. Cetere tiu lasta intertempe simpliĝis pro la grandskala uzo. Ĝi pli kaj pli similas al Basic English. Fakte nur Esperantolando estas nigra (aŭ pli precize verda) makulo sur la mapo de la anglalingva hegemonio. Iom ŝvitante pro la varma klimato mi memoris ke jam, kiam mi ankoraŭ okupiĝis pri la lingvo iniciatita de Zamenhof ĝi komencis danĝere ŝveli kiel la rano, kiu volas esti pli granda ol bovo. Pretekstante fajnajn diferencojn jam delonge balastaj radikoj estis enmetigitaj. Nun se la mondo volus uzi esperanton tiu montriĝus neuzebla.

Mi ekvidis konatan vizaĝon, kies posedanto jam de trelonge fariĝis akademiano malgraŭ (aŭ pro) la amaso da neologismoj en liaj romanoj. Ankaŭ li rekonis min kaj ni iom babilis. Temis ĉefe pri malnovaj anekdotoj. Mi informiĝis pri tio, kiu ankoraŭ vivas kaj, kiu migris ĉi tien.

Post kvin minutoj li pardonpetis kaj klarigis, ke nun li devas foriri ĉar li ankoraŭ ne atingis la monatan kvoton de novaj vortoj, kiun la ŝtato per *reglamento* postulas de la akademianoj.

Poste mi preterpaŝis terason de kafejo. Mi ne povis sekvi la konversaciojn de la multaj altablighintoj nur ondoj de frazeroj atingis mian orelon. Aro de nekonataj vortoj.

Kelkaj el ili ŝakludis. De pli proksime mi rimarkis ke ili kompreneble ne uzas la klasikan varianton sed "steloŝakon", kiu estas stelforma. Plia loka unikaĵo: la figuroj kaj kvadratoj ne estas nigraj kaj helaj sed verdaj kaj blankaj. Iu grizakapulo kun tipa Esperantista aspekto diris al sia kontraŭlo "ne *mava* movo!"

Pri korpaj sportoj mi rememoris, ke mi legis ke Esperantolando petis rajton partopreni la olimpiajn ludojn.

Pluirante laŭ la bulvardo Waringhien mi alvenis al bazaro. Jam de malproksime aŭdiĝis voĉoj de la vendistoj "aĉetu, aĉetu estas *ĉipa*", "vi ne trovos *men* koste aliloke". Iom malsata mi decidis aĉeti kelkajn pomojn. Laŭ la ŝerco unu pomo tage forpelas la kuraciston, kondiĉe ke oni bone celas.

Mi ŝatus unu kilogramon da pomoj.

-Ĉu vi ŝatas aplojn, apflojn aŭ pomojn?

-Kio estas la diferenco?

-Pomoj estas ruĝaj, aploj estas la verdaj, kaj apfloj la flavaj. Vidu kiel nia lingvo superas la aliajn per siaj fajnaj nuancoj! Leksikona kancero mi pensis... La vendistoj rimarkigis ke mi parolas kiel en la malnovaj libroj. Mi ridetis kaj serĉis la monujon. La monounuo uzata sur la insulo nomiĝas "stelo". Tabuleto indikis la prezon de la fruktoj: tricent steloj la kilogramo.

En preskaŭ ĉiuj aliaj landoj la dolaro estas la monounuo. Esperantolando vivas en ekonomia aŭtarcio, sed tie oni akceptas ankaŭ la dolarojn de la turistoj. Mi pagis en dolaroj. La mezaĝa vendisto redonis en steloj. Dum mi metis la verdajn biltetojn en mian monujon mi detale observis ilin. Sur la bileto de dek steloj estis portreto de L. L. Zamenhof kun la subtitolo "kreinto de Esperanto".

Kompreneble, mi pensis, oni ne skribis "iniciatinto" aŭ "iniciatoro" kiel li volis. Sur la dudek steloj rolis la kalva sed tamen harfendanta Kolomano Kalocsay. Sur kvindek steloj Waringhien. Sur la 100 stela bileto la vizaĝo de iu Zaleski, posteulo de Zamenhof. Li okupas folkloran reĝan postenon. Liaj taskoj konsistas plejparte el festaj paroladoj kaj tranĉado de rubandoj dum inaŭguroj ktp... Sed la vera potenco estas en la manoj de la fondinto (aŭ *establinto* kiel oni diras ĉi tie) de la ŝtato. Ties vizaĝo grimace ridetas sur la biletoj de 500 steloj.

Mi legis kaj nun konstatis propraokule ke la ĉefa enspezfonto de la lando estas turismo. Turistoj venas el ĉiuj teropartoj pro la plaĝoj (nomataj ankaŭ strandoj kaj *plajoj* depende de la ĉeesto kaj grandeco de la sableroj), sed ankaŭ por vidi la kulturajn programojn kiel ekzemple la tutnoktan nacian dancon (la bambon). Esperantolando eksportas ĉiuspecajn stelojn. El oro, arĝento, broditaj ktp. La tradiciaj manĝaĵoj estas spinaco kaj menta trinkaĵo. Etoso estas la ŝlosilvorto de la sloganoj por allogi la turistojn. Ankaŭ en la vojaĝoficejo, kie mi aĉetis la flugbileton estis plenstela afiŝo kun la titolo "*diskovru* la nekompereblan esperantan etoson!".

Tiam soldata veturilo preteriris min. Ŝajnas do ke la landeto havas eĉ armeon. Ĝia simbolo similas al la usona blanka stelo sur malhelverda fono: nur inverse estas verda stelo en blanka kvadrato. Diversloke en la urbo eblas vidi armeajn veturilojn kun tiu simbolo.

Alvenis la tempo de la rendevuo. Mia malnova konatulo alvenis. Li zorge rigardis ĉirkaŭ si, tiam preteriris min fluŝtrante "sekvu min diskrete". Je distanco de dudek metroj mi postpaŝis la blankharan nobelpremiiton de fiziko tra labirinto de stratetoj kun la plej diversaj nomoj "Zelazni",

"Lanti", "Piĉ" ktp. Finfine ni atingis la pordon de lia loĝejo. Li salutis min.

- Mi ĝojas ke vi povis veni kaj ke ne estis problemo ĉe la dogano. Pardonu pro tiu vagado sed la verda polico tre aktivas nuntempe. La popolo iom malkontentas kaj la nedemokratia registaro provas silentigi la opoziciulojn. Ah, kien ni iris, la povra Zamenhof verŝajne turniĝas en sia tombo...

*Ĉar tiu rakonto havas du eblajn finojn, ĉi tie la kara leganto estas petata ĵeti moneron en la aeron. Se post refalo la bilda flanko estas videbla li iru al paĝo numero 16 kaj legu la tiean lastan alineon. Se la nombra flanko videblas li daŭrigu la legadon ĉi sube:*

- Ankaŭ mi ĝojas revidi vin sed kio estas tiu sekreta plano pro kiu vi nepre volis revidi min?

Tiam la fizikisto klarigis ke daŭriginte la esplorojn pro kiuj li ricevis la Nobelpremion li trovis manieron reveni en la pasintecon. Li aldonis ke li jam provis kun hundo.

Iom diferencas de la sciencfikciaj rakontoj ĉar oni juniĝas dum la retrovojaĝo en la tempo kaj oni ne memoras ke oni venis el la estonteco. La fizikisto rimarkis tiujn kromefikojn kiam la juna hundo, kiun li akiris unu semajnon antaŭ la eksperimento, sendita du monatojn en la pasintecon ne rekonis lin, kiam ĝi reatingis la punkton de la nuneco. Ĝi aspektis tute sama kun la nekutima makulo sur la felo, kaj ne ŝanĝiĝis, kvankam dum du monatoj tiom aĝaj hundidoj multe kreskas.

Poste la Nobelpremiito malkaŝis sian planon: sendi

volontulojn en la estintecon antaŭ la tempopunkton, kiam la esperantomovado tute misvojiĝis kaj ekiris sur la vojo, kiu kondukis al tiu folkloro ŝtato. Tiel eblus modifi la historion por ke Esperanto fariĝu INTER-nacia lingvo kaj per tio ankaŭ bonigi la staton de la mondo.

Li elektis dek fidindajn personojn (do ne verdŝovinistojn) kaj sufiĉe aĝajn, kiuj en la pasinteca celoperiodo havis inter 25 kaj 35 jarojn. Cetere, en kazo de misfunkcio de la eksperimento, estas pli bone sendi homojn al kiuj ĉiukaze restas nur malmultaj vivotagoj.

La sekvan tagon kun la aliaj dek volontuloj ni kolektiĝis en la kelo. Laŭvizaĝe mi rekonis kvin el la kunvojaĝantoj. Staris inter ili eĉ unu estis pentinta eks-”Civitano”. Ĉie lumis kaj bruis strangaj aparatoj. Ĉar ni ne memoros tion, kio okazis poste, hieraŭ vespere oni tatuigis la celon de la misio sur niajn femurojn.

Unu post la alia ni sidiĝis en la skatolon konektita al multaj kabloj. Kiam venis mia vico mi iom timis, lokiĝante en la komfortan fotelon. Komencis brui la aparataro. Mi sentis min pli kaj pli malpeza kaj fine svenis...

## **ENHAVO**

LA PLANEDO DE LA SENFELAJ SIMIOJ.....	1
LA MONDOLINGVO.....	8
LA MARTELISTOJ.....	15
SEKRETA DOKUMENTO.....	17
REVENO AL ESPERANTOLANDO.....	22

### **Retejo pri similaj temoj:**

<http://www.interpopolalingvo.inf.hu>

### **Aperontaj:**

- Pliaj mallongaj rakontoj
- Teniso: bone ludi pli facile kaj malmulte koste (Instrulibro pri teniso en la internacia lingvo)

### **Aliaj eldonaĵoj:**

- SoftMemor komputila programo, kiu rapidigas la enkapigon (interalie de esperanta vortotrezoro kaj gramatiko).

Kontaktadreso:

**ABONASOFT**

1093 Budapest

Bakats utca 1/3

Hungario

abonasoft@gmail.com

<http://abonasoft.inf.hu>

Tel./Fakso +36 1 2173912

